

Eŭropa Bulteno

Julio-aŭgusto 2016, Numero 162

PAROLADO DE VYTENIS ANDRIUKAITIS, EŬROPA KOMISIONANO PRI SANO, DUM LA MALFERMO DE LA LINGVOPOLITIKA KONFERENCO EN NITRA



Mi estas ravita esti ĉi tie en Nitra por tiu ĉi grava konferenco, kiu traktas lingvan komunikadon en EU, kaj mi dankas la organizantojn pro la granda laboro dum la pasinta jaro. La tri temoj de la konferenco estas aparte aktualaj en la hodiaŭa Eŭropo. Ili estas civitana engaĝiĝo kaj multlingvismo; ekonomia integriĝo kaj multlingveco; kaj eduka inkludo per plibonigita lingvolernado. Eŭropa integriĝo estis foje kritikata kiel laŭdire tro malproksima de la civitanoj; ke ĝi okupiĝas pri la ekonomio anstataŭ pri la civitanoj; ke ĝi malsukcesis alparoli la civitanojn en la profunda, emocia nivelo. La kresko de eŭroskeptikaj politikaj movadoj en la lastaj jaroj povas grandparte esti sekvo de fortaj naciaj identecoj fronte al la eŭropa identeco, kiu estas malforta aŭ neekzistanta.

Civitanoj konsideras la multlingvisman politikon de EU malforta, ĉar en la praktika vivo ili estas ofte devigataj uzi en siaj kontaktoj kun EU-institucioj nur unu aŭ du regantajn lingvojn. Tio kondukas al kreskanta fremdiĝo de EU ĉe civitanoj kies lingvoj ne estas vaste uzataj de la

EU-institucioj. Tia malegaleco devus ne ekzisti. Multlingveco estas kerna EU-valoru, ĉar ĝi estas reprezentata mem en la koro de la devizo de Eŭropa Unio: *Unuiĝintaj en diverseco*. La kvar liberecoj, kiuj staris en la centro de la eŭropa projekto ekde la komenco – la libera moviĝo de varoj, personoj, servoj kaj kapitaloj – ĉiuj implicas interŝanĝon inter parolantoj de malsamaj lingvoj, ĉu rektan ĉu helpe de profesiaj tradukistoj kaj interpretistoj. Faktas, ke ni ĉiuj malsamas, **sed ni ĉiuj estas egalaj**. Ĉiu lando havas sian propran kulturen identecon, malsamajn kulturajn minoritatojn kaj ofte ne nur unu oficialan lingvon, sed ankaŭ plurajn malsamajn fremdlingvojn ene de sia tereno. Kaj tiu bunteco igas nin malsamaj, sed ankaŭ egalaj, almenaŭ se temas pri niaj rajtoj kaj ŝancoj.

Multlingvismo estas esenca por certigi ne-diskriminacion en la traktado de EU-civitanoj, kaj por certigi ke ĉiuj lingvoj parolataj ene de EU, grandaj kaj malgrandaj; naciaj, regionaj kaj minoritataj lingvoj; estu respektataj kaj protektataj egale.

Ĉiu lingvo estas centra elemento de la identeco de sia parolanto. Proksimume 18 % de la tuta EU-loĝantaro havas la germanan kiel sian gepatran lingvon; malpli ol 1 % parolas la litovan, mian gepatran lingvon. Sed tio ne gravas por mi. La litova estas la lingvo kaj la pensmaniero, en kiuj mi kreskis; ĝi estas la unua paro de lensoj tra kiuj mi lernis rigardi la mondon. Mi memorigu al vi, ke Eŭropa Unio estas bela pacprojekto. En 2012 EU ricevis la Nobel-premion por paco pro antaŭenigado de paco, repaciĝo, demokratio kaj homaj rajtoj en Eŭropo. La multlingveco en EU povus kaj devus esti ekzemplo por strebado pri vivo en paco kaj diverseco. Ekzistas pluraj landoj, kiuj havas du aŭ tri oficialajn lingvojn, kiel Belgio, Finnlando aŭ Irlando, kompreneble. Kelkfoje ĉiu de tiuj lingvoj ludas malsaman rolon, sed mem la ekzisto de tia multlingveco estas evidenta esprimo de demokratio. Sekve, en la Eŭropa Parlamento kaj en la Eŭropa Konsilio ĉiuj 24 EU-lingvoj estas plene uzataj. En la Eŭropa Komisiono ni havas tri procedurajn lingvojn, sed multaj dokumentoj estas tradukataj ankaŭ en ĉiujn ceterajn EU-lingvojn.



Por konservi la lingvan diversecon en EU, ni en la eŭropaj institucioj multe uzas tradukadon. Kompreneble ne eblas traduki ĉiun dokumenton kaj ĉiun novaĵon, kiun publikigas la Eŭropa Komisiono, al 24 lingvoj. Tamen, la plimulto de la informoj, kiuj interesas la ĝeneralan publikon, kiel la portalo de Publika Sano kiun administras miaj propraj servoj, estas disponebla en ĉiuj aŭ plejparto de la oficialaj lingvoj.

Sed eĉ kun la ĉiam kreskantaj ŝancoj provizi facile kompreneblan informon al ĉiuj, ni daŭre memoru, ke la regado de aliaj lingvoj donas en konkurenca medio konsiderindan avantaĝon. Estas do grave, ke pluraj lingvoj estu instruataj en lernejoj. Lernantoj ankaŭ bezonas akiri prilingvajn kompetentojn kaj malferman sintenon al lingvoj, kiuj ebligas al ili daŭre disvolvadi siajn lingvokonojn dumvive.

Eŭropa Unio do finance subtenas lingvo-instruadon, kaj ĝi ankaŭ agnoskas la gravecon de lingva diverseco, subtenante la instruadon kaj de grandaj kaj de malgrandaj lingvoj. Ni helpas la Membroŝtatojn per aktivecoj de kunlernado, kiuj faciligas la interŝanĝon de bonaj praktikoj, por ke povu ekesti raportoj kiel tiu, kiun vi vidas ĉi tie, kaj financadon tra Erasmus+ kaj pluraj aliaj iloj.

La kunlaborado inter membroŝtatoj en la kampoj de lingva instruado kaj lernado estas ege bonvenigataj fare de la Eŭropa Komisiono. La kapablo komuniki en pluraj lingvoj estas parto de la Ŝlosila *Competence Framework for Lifelong Learning*, kiun la Komisiono revizios kaj plifortigos kiel parton de la Agendo de Kapabloj kiu estis adoptita antaŭ nur iom pli ol unu monato.



Ĉiuj tiuj menciitaj mezuroj estas esencaj ĉar ili povas ne nur trakti la bezonojn de eŭropanoj kiuj venas de ŝanĝiĝanta socio, sed ili ankaŭ kontribuas al pli forta kaj pli proksima integriĝo. Ekzemple, la projekto MIME = Multlingvismo, Inkludo kaj Moviĝemo en Eŭropo = kiun kunordigas la Universitato de Ĝenevo kaj Profesoro François Grin, disponigas sciencan subtenon kun la celo montri, ke inkludo kaj moviĝemo estas plene kongruaj kun la hodiaŭa multlingva Eŭropo. Ni devas, do,

daŭre antaŭenigi la plej bonajn praktikojn de lingvoeduko ĉie en EU.

Ni devas konsideri ankaŭ ĉiujn ilojn disponeblajn por atingi tiujn celojn. Do bonvolu permesi al mi daŭrigi mian paroladon per mia persona opinio pri alia afero, kiu estas tro ofte forgesata, sed povus esti same same grava - Esperanto.

Por mi persone Esperanto havas klaran ligon kun la lukto kontraŭ devigo. En la sovetia tempo la uzo de Esperanto estis protesto kontraŭ la reganta rusa lingvo, kiun oni devigis al ni uzi. En la disidenta movado mi proponis paroli Esperanton anstataŭe - kiel simbolo de humanismo kaj demokratio.

Do, kiel juna viro mi lernis tiun lingvon, ĉar mi estis inspirita de ties interna ideo, la idealo de mondo en paco. La instiga idealo de Doktoro Ludoviko Zamenhof, kiu iniciatis Esperanton, estas ofte miskomprenata: **Paco, bazita sur egalaj rajtoj kaj justeco**. Esperanto estas nur ilo, kvankam tre grava ilo, por helpi atingi tiun idealon. Tiu idealo interkroĉiĝas nete kun la celo de Eŭropa Unio, kiun oni foje priskribas kiel la plej sukcesan pacprojekton iam ajn. Ĝi alportis al la 28 EU-landoj la plej longan periodon de paco en la historio.

Kiel Umberto Eco iam skribis, la vivo de Zamenhof povas esti inspiro al ni. Li parolis multajn lingvojn flue, kaj estis tiel bona ekzemplo de multlingvismo en praktiko, multlingvismo al kiu EU aspiras. Tamen lia tuta vivo estis regata de pasio defendi la egalan homan dignon de ĉiu homo, evitante ke fortuloj trudu siajn lingvojn al aliuloj. Li komprenis, ke tiu reciproka

agnosko de egalaj homaj rajtoj de ĉiuj civitanoj endas por daŭra paco. Interesa libro de Dr Ulrich Lins, *La Danĝera Lingvo*, priskribas la provojn de la reĝimoj de Hitlero kaj Stalino mortigi Esperanton. Hitler malamamis tiun "artefaritan lingvon elpensitan de judo", kaj mencias ĝin en *Mein Kampf*. Stalin komprenis ke la rekta internacia komunikado, kiun ebligas Esperanto, povus rapide subfosi lian propran propagandon. Ambaŭ reĝimoj murdis multajn esperantistojn, kaj oni povas diri, ke lingvo pro kiu homoj mortis, enradikiĝis en la homa historio kaj ne plu estas konsiderata kiel "artefarita".

Mi ŝatus korekti iujn miskomprenojn pri Esperanto. Kelkaj foje diras: "*Esperanto ne havas kulturon*." Tiuj, kiuj pensas tiel, estas tiom ligitaj al la ideo de nacia kulturo, al naciisma koncepto, ke ili ne kapablas imagi lingvon kies kulturo estus komuna al la tuta homaro. Tamen Esperanto havas ĉion kion havas la plej evoluintaj naciaj lingvoj - poezion, kantojn, teatron, fikcion kaj nefikcion, elstarajn tradukojn el la plej bona monda literaturo, verkatajn de denaskaj parolantoj de tiuj lingvoj. Esperanto dum sia preskaŭ 130-jara ekzisto kaj evoluo kreis sian propran riĉan originan kulturon al kiu kontribuas ĉiuj uzantoj el diversaj nacioj kaj etnoj de la mondo, kio fariĝis monda heredaĵo.

Esperanto estas multilate aliancano de malgrandaj lingvoj. Ĝi ebligas komunikadon tutplanede, tamen ĝia tre efika gramatiko kaj vortprovizo ebligas al homo ellerni ĝin tre rapide, en proksimume unu dekon de la tempo kiu necesas por ellerni iun ajn nacian lingvon. Krome, la propedeŭtikaj kvalitoj de Esperanto, kiuj estis ofte testataj en praktiko, akcelas kaj plibonigas la postan studon de aliaj lingvoj. Ĝia vortprovizo estas ĉefe hind-eŭropa, kaj ĝia sintakso havas multon komunan kun lingvoj tiel diversaj kiel la finna, hungara, turka kaj mandarena ĉina. Ĝi estas tiel ideala lanĉilo por la studo de aliaj lingvoj. Tiu fenomeno estos diskutata pli detale dum nia konferenco.

La angla estas tre utila kaj disvastigita en la hodiaŭa mondo, sed ĝi neniam povas doni la egalecon en komunikado kiun donas Esperanto - kie ĉiuj akceptas lerni facilan, neŭtralan lingvon, kaj tiel evitas la imperiismon de unu nacia lingvo, kiu donas dumvivajn, nemeritatajn privilegiojn al denaskuloj, kaj maljuste metas la plimulton de la homaro en konstantan malavantaĝon. Eĉ la plej fervoraj Esperantistoj ne dezirus ke ĝi anstataŭu aliajn lingvojn. Zamenhof verkis poezion en sia denaska jida, kaj en la rusa, lia lingvo de studo. Li tradukis la tutan Malnovan Testamenton de la hebrea al Esperanto. Kiel poeto, Zamenhof plene konsciis la neanstataŭigeblan valoron de ĉiu homa lingvo. Per Esperanto, la literaturaj gemoj de mia litova, kaj aliaj malgrandaj lingvoj kiel la hungara, la kroata kaj la slovaka, trovis sian vojon al la ĉina kaj japana, kaj tiel kontribuas al la internacia kompreno kiu estas esenca por paco.

Ene de EU, rolo por Esperanto povus helpi plifortigi komunan eŭropan identecon, kaj tiel igi EU pli efika en ties rolo de laboranto por paco en Eŭropo kaj en la tuta mondo. EU kaj Esperanto komune havas engaĝiĝon al paco, al justeco kaj al ne-diskriminacio. EU tute ne konscias la vastan potencialon de Esperanto por pliproksimigi civitanojn al la eŭropa integriĝo, kaj unu al la alia. Plibonigita lingva komunikado povus multe lerni de la ĝenerala progreso de la eŭropa integriĝo, bazita sur la ideoj de Robert Schuman kiel unue esprimitaj la 9-an de majo 1950: "*Eŭropo ne fariĝos subite, aŭ laŭ unu sola plano. Ĝi estos konstruita tra konkretaj atingoj, kiuj unue kreos faktan solidarecon.*"

Simile Esperanto ne progresos subite, sed tra la libervolaj decidoj de kelkaj membroŝtatoj por doni al ĝi lokon en siaj instruplanoj, komence kiel helpilo por lingvolernado ĝenerale. La 4 Viŝegradaj landoj havas idealan pozicion por fari tiun unuan paŝon, en la kadro de sia jam bone evoluinta kunlaboro en aliaj kampoj. Mi esperas ke la Nitra konferenco, konstruante sur

la Bratislava konferenco de 2006, ludos gravan rolon en la fortigado de multlingvismo kaj en la certigo de praktika uzo de ĉiuj niaj lingvoj. Ni neniam forgesu, kio estas la komuna celo de Esperanto kaj Eŭropa Unio - PACO.

Nitra, la 28-an de julio 2016

LINGVO-POLITIKA KONFERENCO EN NITRO LANĈIS DISKUTON PRI LINGVA KOMUNIKADO EN EU



Paralele kun la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitro okazis inter la 28-a kaj 29-a de julio 2016 malfermita lingvo-politika konferenco de Viŝegradaj landoj (V4) + samopiniantaj landoj de EU pri la temo „Perspektivoj de lingva komunikado en EU“. La konferencon organizis la Fakultato de Mezeŭropaj Studoj de la Universitato de Konstantino Filozofa (UKF) en Nitro kaj la Slovaka Esperanto-Federacio sub aŭspicio de Miroslav Lajčák, Ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio. La konferenco estis listigita inter aranĝoj de la Prezidanteco de Slovakio en la Konsilio de EU organizitaj de neregistaraj organizoj en la 2-a duonjaro de 2016.

La konferencon partoprenis kiel ĉeforatoro Vytenis Andriukaitis (LT), Komisionano de EU por Sano kaj Nutraĵsekureco, kiu estas esperantisto. Li prezentis sian paroladon en Esperanto! Li estis la unua EU komisionano, kiu uzis dum oficiala evento Esperanton. Li akcentis en sia parolado, ke la EU estas paca projekto, sed mankas al ĝi komuna paca lingvo. Esperanto estas la plej taŭga lingvo por plenumi tiun ĉi rolon kaj ankaŭ esprimi paneŭropan identecon de civitanoj, respektante ĉiujn iliajn identecojn (vidu la supran artikolon).

Ján Figel' (SK), eksa Komisionano de EU por Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo (2004-2009) kaj aktuala Ambasadoro de EU por Religia Libereco en la mondo ne povis partopreni en la konferenco, sed sendis al ĝiaj partoprenantoj tre pozitivan mesaĝon. Li menciis, ke ĝisnunaj instrumentoj de fremdaj lingvoj ne alportis atendatajn rezultojn. Pro tio oni devas

serĉi novigajn alirojn, kiuj kostos malpli kaj ebligos akiri pli bonajn rezultojn. Li rekomendis utiligi propedeŭtikan valoron de Esperanto en fremdlingva instruado kaj ĝian internan pacan ideon por plibonigo de interretnaj, interkulturaj kaj interreligiaj rilatoj kaj solvado de problemoj en EU /Eŭropo kaj la mondo.



En la plenkunsido estis prelegoj de prof. Eva Poláková (Universitato Matej Bel, Banská Bystrica) “Aktivaĵoj de la slovakaj civitanoj platformo en la kampo de internacia komunikado”, d-ro Ildikó Vančo (Universitato de Konstanteno la Filozofo) “Eŭropa lingva reĝimo: nacioj, minoritatoj, lingvoj”, Seán Ó Rain (Irlando) “Propedeŭtika aliro al la plibonigo de la lingva instruado”.

La konferenco estis nova kaj malfermita, ĉar la unuan fojon partoprenis ĝin kune politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanaj organizoj (neesperantistoj kune kun esperantistoj) el la Viŝegradaj landoj – Ĉeĥio, Pollando, Hungario, Slovakio, sed ankaŭ el samopiniantaj landoj, kiel – Italio, Francio, Germanio, Irlando, Litovio, Latvio, Estonio, Kroatio, Slovenio, Rumanio kaj aliaj landoj por diskuti pri neglektataj lingvaj komunikaj problemoj en la EU.

Partoprenantoj komune diskutis en paneloj kaj rondaj tabloj pri 3 ĉefaj temoj. Dum la fina plenkunsido ili aprobis konkludajn dokumentojn: „Nitran Deklaron“ kaj 3 dokumentojn pri la temoj de la konferenco kun rekomendoj por novigaj projektoj, esploroj kun la celo egalrajtigi kaj efikigi lingvan komunikadon por ĉiuj civitanoj de EU.

En „Nitra Deklaro“ oni diras, ke "Briteliro klare montris, ke la nuna krizo de la eŭropa integriĝo estas krizo de identeco. Nuntempe ne ekzistas lingvo kiu esprimus tuteŭropan identecon. La angla, kiel mondlingvo, ne estas taŭga lingvo por esprimi la eŭropan identecon. Lingva maljusteco kreas diversajn formojn de ekonomia kaj socia diskriminado. Ni vidas klaran bezonon de novaj strategioj por plibonigo de fremdlingva instruado, kaj empiriaj esploroj pri temo, kiu fremda lingvo povus plej verŝajne stimuli plian lernadon de alia lingvo."

La rezultoj de la konferenco formulitaj en konkretaj rekomendoj postulas renkontan starpunkton de EU kiel tuto kaj de la registaroj de la membroŝtatoj por ŝanĝo de la nuna sensistema, maljusta lingvopolitiko en Eŭropo al tiu, baziĝanta sur la kontraŭdiskriminaciaj principoj.

La organizantoj de la noviga malfemita lingvo-politika konferenco esperas, ke pere de ĝi ili kontribuis al malfermado de nia Movado al fakuloj de la ekstera mondo, kontribuis al la komenciĝanta tuteŭropa diskuto pri estonteco de Eŭropo kaj atentigis pri graveco de egalrajta kaj justa lingva politiko en EU, kiel integriga faktoro kaj ilo al lingva diverseco kaj al komuna eŭropa identeco.

Komisionano de EU, Andriukaitis vizitis postagmeze la 28-an de julio kongresejon de la 101-a UK, kie li estis akceptita de prof. Humphrey Tonkin nome de UEA kaj Peter Baláž, prezidanto de Slovacia Esperanto Federacio kaj prezidanto de LKK de la 101-a UK, kiuj prezentis al li strategian agadon de UEA por malfermi Esperanto-movadon al la ekstera mondo kaj riĉan programon de la malfermiĝanta 101-a UK en Nitro pere de 3 paralelaj malfermitaj fakaj aranĝoj (la 20-a Internacia Medicina Esperanto Konferenco, la Mezeŭropa Interreligia Forumo, la Lingvo-politika Konferenco de V4+ landoj).

Fine de la vizito de Andriukaitis en Nitro okazis lia kunveno kun delegacio de la Eŭropa Esperanto Unio kaj organizantoj de la 20-a Internacia Medicina Esperanto Konferenco (de la Fakultata Hospitalo de Nitro kaj la Universala Medicinista Esperanto Asocio) pri estonta kunlaboro kaj projektoj por serĉado de egalrajtaj kaj justaj solvoj de lingvaj problemoj en sanprizorgado kaj aliaj terenoj de EU.

Jozef Reinart

Sekretario de LKK de la 101-a UK por eksterlandaj, diplomaciaj kaj fakaj aferoj

La programo de la konferenco:

http://www.polaco.fss.ukf.sk/conference/images/prog/prog_sk_eo_en.pdf

NITRA DEKLARO

"Perspektivoj de lingva komunikado en EU"

Nitra, Slovakio, 28 - 29 julio 2016



L'Italia è Fatta. Restano da fare gli italiani.

(Ni faris Italion. Nun ni devas fari italojn), Massimo d'Azeglio, 1866.

Ni faris Eŭropon, nun ni devas fari eŭropanojn. Nur eŭropanoj povas havigi la necesan afekcian kaj demokratian legitimecon al EU. Briteliro evidentigis ke la nuna krizo en la eŭropa integriĝo estas identeca. Regi diversecon estas la ŝlosila afero. Bezonatas plibonigi tiun regadon per akordigo de registaraj instancoj

kun komunikaj komunumoj. La manko de tia akordigo estas ekzisteca problemo por EU.

Multaj civitanoj prave timas ke, por sukcesigi Eŭropon, ilia nacia identeco detruigĝos. Necesas okupiĝi pri tiu timo. La civitana engaĝiĝo en Eŭropo restos malforta ĝis la civitanoj eksentos eŭropan identecon, en harmonio kun siaj identecoj nacia kaj regiona. Tiel estas ĉar, malgraŭ la grandaj paŝoj antaŭen de la eŭropa integriĝo en la ekonomia kaj komerca kampoj, ties kulturaj, edukaj kaj lingvaj aspektoj restis ĉe la nacia nivelo. Ĝis nun ne okazis provo evoluigi komunan edukadon por eŭropaj civitanoj. Lingvoj ebligas komunikadon sed, egale grave, ili esprimas identecon. Ekzistas nuntempe neniu lingvo kiu esprimus tuteŭropan identecon. La devizo de EU „unuiĝintaj en diverseco“ ŝajnas favori diversecon je la kosto de unueco. Necesas tamen celi ekvilibron inter ili.

La kreskanta tutmondiĝo kondukis al superregado de la angla. Kiel tutmonda lingvo, la angla tamen malbone povas esprimi eŭropan identecon. Se Britio forlasos la Eŭropan Union, nur 10 % de EU-civitanoj parolos la anglan kiel gepatran lingvon aŭ tre bone kiel fremdan lingvon. Ekskluziva uzo de la angla en EU pliprofundigus socian malegalecon kaj la angla estus perceptata kiel elitisma lingvo. Troa koncentriĝo je la angla estas la ĉefa faktoro kiu malfortigas la deziron studi aliajn lingvojn. Lingva malegaleco estas ofte rezulto de malprudentaj lingvaj politikoj kaj ne produkto de spontaneaj sociekonomiaj fenomenoj. Lingva maljusteco generas diversajn formojn de ekonomia kaj socia diskriminacio. Helpe de taŭgaj lingvaj politikoj ni devus okupiĝi pri tiuj ĉi fenomenoj ĉe la EU-nivelo.

Ekzistas ĝeneraliĝinta tendenco subtaksi la gravecon de lingvopolitiko kiel integranda faktoro. Tio fortikigas la nunan situacion, kiu estas neakceptebla eĉ por britaj civitanoj, kiel montris Briteliro kaj aliaj referendumoj. Multlingveco estas kerna EU-valoro kaj samtempe kerna valoro por certigi egalecon de EU-civitanoj kaj ankaŭ parolantoj de regionaj kaj minoritataj lingvoj. Necesas esplori tiujn ĉi gravajn kampojn.

Instruado de fremdlingvoj ne donas la atendatajn rezultojn. Kaj Eurobarometer kaj SurveyLang montris malkreskon de scipovo de la unua kaj de la dua fremdlingvoj. Ni vidas klaran neceson de nova strategio por plibonigi lingvolernadon kaj plialtigi lingvokonscion kaj interkulturajn kapablojn, nome per empiria esploro kiu fremdlingvo plej verŝajne kuraĝigos postan lernadon de pliaj lingvoj. La landoj de Visegrad 4+ estas ideala kadro por enkonduki tiun ĉi novigan aliron kaj por realigi praktikajn paŝojn, tiel kontribuante kaj al lingva diverseco kaj al komuna eŭropa identeco.

NOVA PROJEKTO DE EEU AKCEPTITA POR FINANCCADO KADRE DE PROGRAMO EŬROPO POR CIVITANOJ

Kiel jam estis publikigite en EB komence de la jaro EEU verkis kaj forsendis du monpetojn por projektoj kadre de la programo Eŭropo por civitanoj, kadre de du malsamaj subprogramoj: Projektoj de civilsociaj organizoj kaj Rememorprojektoj. Meze de julio estis oficiale publikigitaj la rezultoj de la konkurso kaj evidentiĝis ke unu el la du projektoj estis sukcesa. Temas pri la rememorprojekto titolita “Rakontoj de rememoro: rememoroj pri rifuĝintoj el jugoslava milito por kreo de paca kaj tolerema EU”.



Co-funded by the
Europe for Citizens Programme
of the European Union

Ĉiujare estas publikigataj aktualaj temoj por rememorprojektoj inter kiuj ĉi-jare estis rememoro pri komenco de milito en Eksjugoslavio kies 25-a datreveno estas ĉi-jare. EEU kaj la slovena partnero AEK

(Asocio por Eŭropa Konscio) el Maribor komune ellaboris la ideon de la projekto, kies celo estas pere de rememoro kaj rakontoj de rifuĝintoj el eksjugoslavaj landoj, kiuj dume grandparte aŭ revenis al siaj landoj aŭ integriĝis en la sociojn de landoj al kiuj ili alvenis, helpi krei pli da toleremo kaj malfermiteco al aktuale alvenantaj rifuĝintoj al pluraj landoj de EU. Espereble rakontoj de eksrifuĝintoj povas helpi plifortigi pretecon de homoj solidari.

En la projekto kunlaboros krom EEU ankoraŭ kvar partneroj: AEK (Asocio por Eŭropa Konscio) el Slovenio, E@I el Slovakio, Kultur und Bildungsprojekte e.V. el Germanio kaj Österreichische Gesellschaft für Kinderphilosophie (Aŭstria Asocio por Infanfilozofio) el Aŭstrio. Kadre de ĉiuj partnerorganizoj krom la aŭstra partnero, pri la projekto kunlaboros pluraj esperantistoj. La buĝeto de la tuta projekto estas 97.500,00 EUR.

La projektideon ellaboris kune Zlatko Tišljar, Maja Cimerman kaj mi, dum la ĉefan laboron pri verkado de la monpeto, kun miaj konsilo, faris Maja Cimerman de AEK.

Maja Tišljar

101-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN NITRO (SLOVAKIO)



Jam aperis multaj arikoloj en kiuj oni nomas la faktojn (iom pli ol 1200 kongresanoj el sesdeko da landoj, de la 23-29-a de julio 2016 ktp). Tial mi verkos nur pri tio, kio ŝajnas al mi atentinda kaj nekutima.

Turnita eksteren:

1. Oficialuloj parolis en Esperanto

Mi ne memoras kiam dum la malfermo ĉiuj ŝtataj gravuloj parolis en Esperanto. En Nitro tio jam estis komenca surprizo: la kabinetestro de la ŝtatprezidanto de Slovakio (kiu mem ne povis

partopreni) parolis en tre bela Esperanto, sekvis eksa komisionano de Eŭropa Komisiono Ján Figel, same en kvalita Esperanto kaj fine la urbestro. Evidentis ke la organizantoj ege klopodis unue konvinki tiujn gravulojn kaj poste instrui ilin bone kaj senerare legi la tekston. Tio certe kontribuos al pli serioza kompreno de la Nitra Deklaro en la Viŝegradaj landoj.

2. Reklamoj tra la urbo

Estis ege multaj signoj pri la kongreso en la urbocentro: multaj grandafiŝoj, grandaj afiŝegoj sur la teatrejo kaj la Universitato (kiu estis ankaŭ kongresejo) kaj en publikaj medioj multaj artikoloj kaj radio- kaj televidaj raportaĵoj.



3. Kulturprogramoj sur la ĉefa urboplaco por la urbanoj kaj esperantistoj kune

La nacia vespero en kiu prezentiĝis fama nacia folklorensemblo okazis sur ekstere starigita podio sur la ĉefplaco kie estis metitaj pli ol 1000 seĝoj. Krom la kongresanoj la spektaklon rigardis multaj Nitranoj. Anstataŭ kutima teda Internacia Vespero oni aranĝis kanzonfestivalon sur la sama scenejo en kiu prezentiĝis 3 naciaj slovakaj ensembloj kaj tri kvalitaj esperantaj ensembloj. Ili kantis kaj muzikis por la komuna esperantista kaj nitra publiko. Ĉiuj bone amuziĝis

4. Surstrata manifestacio

Vendredon estis organizita marŝmanifestacio. La kolono de kongresanoj marŝis de la kongresejo al la ĉefplaco kun tamburoj antaŭe kaj multaj flagoj kaj sloganoj. La marŝantojn vidis kaj salutis kelkmili pretererpasantaj slovakoj.

LINGVOPOLITIKA KONFERENCO de LANDOJ V4+. Pri tio legu apartan artikolon de Jozefo Reinvert. Tamen mi diru ke la konferencon organizis oficiale la registaro de Slovakio kiel konferencon kiu estis parto de oficiala slovak programo kadre de la slovak prezidado en Konsilio de Eŭropo. Tiun tre postulan konferencon oficiale gvidis la Universitato de Nitro. La ĉefa merito por ĝi iras al Jozefo Reinvert kiu jam du jarojn intense aktivis por ricevi ĉiujn necesajn ŝtatajn subtenojn.



EKUMENAKONFERENCO
Dum mardo okazis ekumena konferenco, pri kiu ni aperigos artikolon en la sekva numero de EB.

DISKUTFORUMOJ PRI BRITELIRO

UEA decidis eksterorde havi en la unua tago (dimanĉon) la diskutforumon pri la ŝancoj por Esperanto post Briteliro. La diskuton gvidis Mark Fettes kaj kungvidis Seán Ó Rain kaj Zlatko Tišljár. Pri la sama temo okupiĝis ankaŭ malferma konferenco de EEU

vendredon kun partopreno de centoj da kongresanoj.

Zlatko Tišljár

ESPERANTO ĈE LA PLEJ GRANDA MUZIKFESTIVALO EN LA MONDO – WOODSTOCK EN KOSTRZYN ĈE POLGERMANA LANDLIMO

Post okjara korespondado de samideano Kazimiro Krzyżak kun la ĉefa organizanto de la Festivalo Woodstock Jurek Owsiak – la petoj pri enkonduko de Esperanto-temoj en ties aktivado fine sukcesis: decembre 2015 ni ricevis proponon organizi kondiĉojn por E-agado tie.

Indas substreki, ke pri enkonduko de Esperanta agado al precipe junulara Festivalo – batalis tiom longe nia la plej maljuna kolego, 88-jara emerita oficiro de Mararmeo – iama fondinto de EDE-PL Sekcio, iniciatinto de gravaj enparlamentaj decidoj por E-movado kaj nune tre merita aganto de CEM – Centro de Interkultura Edukado Nowy Sącz. Ankaŭ pro lia iniciato sukcesis peto agnoski Esperanton kiel Kultura Heredaĵo en Pollando sur la Listo de Naciaj Kulturheredaĵoj.

Dum multaj jaroj, preskaŭ ĉiuj gravaj iniciatoj por la movado havas sian fonton en Nowy Sącz, kie kreiĝis vera centro de E- agado. Tie fokusiĝis multaj edukaj kaj kulturaj projektoj, estis/estas organizitaj gravaj aranĝoj kaj artaj eventoj, sed plej grave – tie estas la sola loko en Pollando, kie konstante daŭras la eduka laboro en 5-6 grupoj, preskaŭ ĉiutage dum tuta semajno... Oni gvidas lingvajn kursojn de infanoj en bazaj lernejoj ĝis senjoroj de la Universitato de Tria Aĝo. Krome – la tutan tempon ni zorgas pri artaj ensembloj – antaŭe „Junaj voĉoj”, nune „e-familio”. Ni ne konas simile aktivan E-Centron en PL aŭ ie ajn en Eŭropo.



Ĝuste tial, ni kuraĝe decidis organizi „grandan eniron” al la mondfama Festivalo kaj anstataŭ proponita de PEJ „stando kun flugfolioj” – preparita estis koncepto de multkultura vilaĝo Esperanto. La organizajn kondiĉojn de ĝi kaj zorgojn pri financado de la projekto – prilaboris kaj realigis kunordiganta la tuton Halina Komar – prezidantino de CEM. Oni devis laŭplane:

- difini celojn kaj rimedojn de tiu ĉi agado,
- organizi laborteamon por la taskoj de nia „Vilaĝo”,
- esplori la kondiĉojn de instalado de tiu objekto celanta informi, instrui, amuzi homojn kaj aranĝi restadon por plenumantoj de la taskoj,
- prepari modestan sed sufiĉan buĝeton, realigeblan kun monstro de eblaj subtenantoj,
- post konfirmo de financaj ebloj – mendi la necesajn instalaĵojn: luadon de grandaj 50m² tendoj, tabloj, benkoj, litoj, matracoj kaj aĉeti aliajn necesajn materialojn por gvidi edukon kaj

artan agadon. La plej gravaj estis inform- materialoj: miloj da flugfolioj, broŝuroj, rulafiŝoj, ŝildo, sed ankaŭ materialoj por pentri, ludi, eĉ regali la gastojn...

- laste – prilabori jam precizan horaron de niaj faroj en la „Vilaĝo”, laŭ la ricevita permeso de la Festivalaj Organizantoj: potage.

Nia Multkultura vilaĝo Esperanto estis situita en la plej prestiĝa zono de la festivala tereno: sur monteto de ASP (Akademio de Belegaj Artoj), kie estis lokitaj ĉ. 60 institucioj/organizoj el kampo de edukado, kulturo, arto. Do – ni troviĝis inter intelekta, idea sociaro. La „Vilaĝo Esperanto” konsistis el du grandaj tendoj kaj 4 tendoj malgrandaj starigitaj malantaŭe, apud 20-persona buso veturiganta nin tien kaj reen kun aldonaj ekipaĵoj, necesaj por preparadi manĝkondiĉojn por 20 personoj. Kolektita mono sufiĉis nur por unu kuirita manĝo tage kaj ni mendis restoraciajn pladojn por tagmanĝoj. Aliaj manĝoj estis preparitaj memstare el komune aĉetatajn manĝproduktojn – modeste sed tamen sufiĉe.

La „Vilaĝanoj” vivis dum la festivalaj tagoj vere kiel bona familio, kion indas substreki, ĉar la grupo estis eĉ 4-generacia: de 12 ĝis 88 jaraĝa kaj 3-nacia.

Planita antaŭe multnacieco ne sukcesis: neglektis siajn promesitajn sindevigojn, detruante nian agadplanon – 2 brazilanoj kaj unu hungarino kaj unu Germano anoncita kiel informanto-helpanto kiu vizitis nin nur por saluti, sed ne kunloĝi kaj kunlabori. Kalkulante ankaŭ 2 junajn personojn, kiuj nuligis sian ĉeeston antaŭ la Festivalo (Polino kaj Hungaro) – ni konstatas, ke en la planita 24-persona teamo, mankis fine 6 junaj persono, el kiuj nur 2 informis nin antaŭe ke ili rezignas.

Ili postlasis vere malbonan opinion pri respondeco/laboremo/aktivula intereso pri la movado, speciale - ke unu el brazilanoj pasigis la tempon en Berlino, de kie li povis iri per urbaj trajnoj al la Festivala tereno! Kaj ni kun honto informis la gastojn, ke preleganto el Brazilo ne povis alveni...



Fine ni restis 18-persone kaj faris „Grandan Rondon Familian” - sentante nin kaj aspektante kiel vera esperantista familio: sindonema, entuziasma, ideoplena... Ili laboris por niaj celoj de matenoj ĝis noktoj, ĉiam pretis informi, inviti, disdoni la materialojn aŭ regali per varma teo, kiam alvenis plua tago.

Tre riĉa estis nia informa stando: grandega 10 m. longa ŝildo informis pri Multkultura vilaĝo Esperanto. Krome – antaŭ la tendoj staris rulafiŝoj kun eldonaĵoj de Stano Marĉek kun ilia ekspozicio apude sur grandaj tabloj. Tre interesis la publikon jam la fakto, ke lernolibroj estis

eldonitaj en kvardek lingvoj, interalie – tre egzotikaj. Kaj la dua informa rulafiŝo starigita ĉe alia flanko de la enirejo invitis al ĵus komenciĝinta kampanjo je aplikado de Esperanto en saĝtelefonoj kaj platkomputiloj Android, kiun preparis Piet Buijnsters, programisto el Hago, tuj antaŭ la Festivalo Woodstock. Ni zorgis pri la urĝa aldono de pola esprimo al la apo, por ke poloj komencu apliki la kurson al siaj mobilaj telefonoj jam julie. Kaj laŭ la informoj de Piet B. - tio okazis! Preparita de ni la 4-lingva informa afiŝo pri la ŝanco apliki E-kurson al telefonoj, estis la plej ofte fotografita de trapasantoj, kiuj tre ofte eĉ ne sciis – kion signifas la vorto Esperanto, sed volis informiĝi pri tio.

Jen malgaja prikonsidero – nur maloftaj tie, maljunaj vizitantoj de nia „Vilaĝo”, sciis ion pri Esperanto, eĉ menciis Zamenhofon aŭ Bjalistokon. Miloj de gejunuloj trapasantaj kaj sidantaj apud niaj tendoj – eĉ ne aŭdis iam la nomon Esperanto. Demando: Kial estas tia situacio? Kial la nuna juna generacio ne kapablas?/ne volas?/ ne pretas agi efike kaj simile al tiel nomata „tria generacio”, danke al kiu ĝis nun Esperanto vivas en Pollando?

La ideon de E-disvastigado dum Woodstock-Festivalo kreis preskaŭ naŭdek jara samideano K.K. En Laborteamo sindoneme laboris 10 personoj maljunaj kaj eĉ 6 el planitaj kaj antaŭe interkonsentitaj gejunuloj rezignis pri helpo. Do - al entuziasmaj, oldaj aktivuloj mi direktas dankvortojn – ili meritas estimon, ĉar danke al ilia laboro – Esperanto nestiĝis ĉe la Woodstock festivalo!

Kaj tia fakto de eniro en junularan publikon je centoj da miloj da ĉeestantoj – estas probable la plej grava atingo de informado pri Esperanto dum multaj jaroj. Ni ne perdu la ŝancojn uzi tion al plifortigo kaj kreskigo de tia formo je la ideumado, kiel la plej bonŝanca.



Informado ĉe la informstano okazis plej parte en la pola lingvo, sed ankaŭ la gastoj estis informitaj en slovaka, germana, itala kaj kompreneble – en la angla lingvo. Nia grava „argumento” pri valoro kaj graveco de Esperanto malgraŭ la ĉiutage uzata en laboro angla lingvo – iĝis geedzoj Cecille kaj Duncan Charters el USA, universitataj profesoroj, kiuj decidis alveni tien kaj labori „por nia afero”. Tre laboremaj, simpatiaj homoj, kiuj konsentis akcepti vere modestajn

kondiĉojn de nia „vilaĝa vivo” en tendumejo, kaj kunlaboris en ĉiu momento – laŭ bezonoj kaj kondiĉoj. Estis aranĝitaj interparoloj kun anglolingvanoj, kun esprimo pri fenomeno de Esperanto kaj ties ideoj. La ĉeesto de gesinjoroj Charters en nia laborteamo multe plivalorigis nian agadon tie.

Ne kalkulebla estas ankaŭ graveco de la laboro de Stano Marček, kiu en la lasta tago eĉ perdis la voĉon pro preskaŭ senpaŭze gviditaj E-kursoj. Speciale dum unu pluva tago, kiam nia gastema tendo fariĝis azilo por malsekaj rifuĝintoj de sub pluvo (ni savis ilin per taso de varma teo/kafo) – Stano ne perdis la ŝancon por vere tuttaga instruado, vespere kun gitaro eĉ

ludante Esperantajn kantojn. Li laboris duoble, pro la likvido de planita „Poliglota Lernejo”, pro nealveno de ĝiaj gvidantoj el BR kaj HU.

En nia tendumejo regis bona etoso, amikecaj rilatoj, kunlaboro por taskoj. Krom planitaj prelegoj, organizitaj estis kelkaj temfokuso pri diversaj temoj, krom Esperanto. Nia Multkultura Vilaĝo Esperanto montriĝis en Woodstock Festivalo – kiel amikema, interesa loko por diversaj vizitantoj kaj gastoj. Postlasita estis bona bildo pri nia agado – vidis tion Organizantoj, kaj ankaŭ multaj vizitantoj anoncis sian alvenon tien venontjare. Ne eblus tion atingi sen granda laboro de ĉiuj 18 personoj de nia - ne nur multkultura sed ankaŭ multgeneracia Laborteamo. Sur la foto kun la iniciatinto kaj jam de 22 jaroj organizanto de la Festivalo Woodstock Jurek Owsiak – troviĝas la plej juna (12j.) kaj la plej maljuna (88j) ĉeestantoj de nia teamo.

Ni havas esperon, ke venontjara laborteamo plijuniĝos, kvankam ĉi jaraj spertoj ne certigas tion. Ĝuste tial ni volas observi, kiel disvolviĝas la afero, kaj ĉu ni trovos la respondencajn junajn kunlaborantojn. Ni ne volas riski perdon dela ĉi-jara rezulto, kaj 8-jarajn zorgojn, por tie instalii Esperanton. Tial ni proponas kunlaboron kun la junularo, sed ankoraŭ ne transdonas iniciaton por Multkultura Vilaĝo Esperanto. Ĝus komenciĝanta nova projekto CEM por „instruado de E- instruistoj”, permesos prepari pli junan aktivularon ankaŭ por Woodstock, atestitan de nia flanko dum la tuta jaro de edukado kaj agado.



Ni dankas al UEA, kiu parte helpis nin monsubtenante konstruadon de la Tendumejo, kaj al CEM-estraro, kiu akceptis elspezojn de organiza mono al la organizado de Multkultura vilaĝo Esperanto. Anonimaj subtenoj egalas kelkcent eŭrojn. La financa raporto estos sendata al UEA – Estraro, TEJO, kaj aliaj monsubtenantoj. Atentigo – neniam en la historio de la E-movado oni havis ŝancon de tiom grandskala informado. Eble decidantoj pri financado de informado/informado tion rimarkos...

Halina Komar

KOREKTO PRI LA LINGVAJ KONSEKVENCOJ DE BRITELIRO

Reage al la artikolo en la pasinta numero de Eŭropa Bulteno mi konstatas: Kvankam ĝi citas ŝajne bonajn fontojn, preskaŭ ĉio en tiu tradukita artikolo estas malĝusta. Precipe, la ideo, ke povas esti nur po unu oficiala lingvo por ĉiu membroŝtato estas nura deliraĵo de Danuta Hübner. Neniu ekzistanta EU-teksto apogas ŝiajn diraĵojn pri tio. Male, la baza principo pri oficialaj lingvoj estas, ke **ĉiuj** oficialaj lingvoj de la membroŝtatoj devas esti oficialaj lingvoj de la Unio. Kaj tio rezultis el simpla jura neceso: dekomence (t.e.

ekde la fondiĝo de EKKŜ, la Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo, en 1952) la eŭropaj organoj faras decidojn rekte aplikendajn en la membroŝtatoj, kio signifas ke la dokumentoj devas esti alireblaj sub samaj kondiĉoj (do ankaŭ samlingve) kiel enlandaj leĝdonaj aktoj.

La sola afero, kiun eblus nomi “avizo” de membroŝtato pri elekto de oficiala lingvo estis la decido de Irlando en 1972 ne insisti pri plena oficialeco de la irlanda. Plenan oficialecon la irlanda lingvo ricevis tamen pli ol tridek jarojn poste, post kiam Malto aliĝis kun siaj du oficialaj lingvoj.

Ankaŭ ne tute ĝustas, ke la fama Reglamento 1/1958 estas interpretebla en sia angla versio kiel postulo pri unu sola lingvo. Se oni prenas laŭeble vortfidelan tradukon de ties Artikolo 8 - “Se Membro-Ŝtato havas pli ol unu oficialan lingvon, la uzendan lingvon regos, laŭ peto de tiu Ŝtato, la ĝeneralaj reguloj de ĝia juro.” – ja eblus ekkompreni, ke temas pri unu lingvo ĝenerale uzenda, sed kun la aldono pri “ĝeneralaj reguloj” tiu interpreto ne eblas, se iu lando havas plurajn egalrajtajn lingvoj: enlande egalrajtaj devas esti egalrajtaj ankaŭ eŭrope. Mi esperas, ke tiuj miaj komentaj utilos por pliseriozigi estontajn diskutojn.

Brian Moon

LA 75-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 75-a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Herrera del Duque, provinco Badajoz, regiono Ekstramaduro de la 30a de junio ĝis la 4a de julio 2016. Partoprenis ĉirkaŭ 150



kongresanoj el 15 landoj.

La kongresa komitato estis organizita de Javier Romero, José Salguero, Raúl Martínez, Tonyo del Barrio kaj Miguel Fernández, kiuj ricevis helpon de multaj kunlaborantoj. En la programo elstaris ekskurso al la vilaĝo kaj monaĥejo de Guadalupe. Koincide

kaj antaŭ la kongreso okazis ankaŭ AMO-Seminario kaj antaŭe eĉ prezentaj agadoj en Madrido ĉe Alkorkono kaj ekskurso tra la ĉefurbo.^[3] La kongresejo estis la Kulturpalaco de Herrera del Duque kaj kelkaj programeroj okazis ankaŭ en la apuda submunicipo Pelosche, kie loĝis parto de la kongresanaro en junulargastejo.

Esperanta vikipedio

KURSO LAŬ LA ZAGREBA METODO EN LA RETO – LERNEBLA INTERAGE EN DEKUNU LINGVOJ

Kiam Internacia Kultura Servo en Zagrebo en 1979 laŭ la iniciato de Zlatko Tišljar lanĉis stencilitajn materialojn por siaj lernantoj, bazitaj je 500 morfemoj de la parola Esperanto, oni apenaŭ pensis ke tiuj materialoj akiros 9 eldonojn en la kroata lingvo kaj tridekon da paperaj eldonoj tra la mondo, famiĝinte kiel Zagreba Metodo de la Esperanto-instruado.

Jen preskaŭ 40 jarojn post tiu evento, nova kunlaboranto, la germana programisto Georg Jaehnig el Berlino kolektis sian internacian teamon kaj kreis la retan platformon en kiu la kurso aperis jam en 11 lingvoj kaj estas daŭre tradukata al pliaj. Nun la lecionoj el la zagreba lernilo estas alireblaj en la lingvoj germana, angla, franca, hispana, ĉina, irana, ukraina, indonezia, portugala, taja kaj malajzia.

Ĉe la unopaj lecionoj la lernantoj povas vidi kaj aŭskulti en bona prononco la tekston, povas trovi ankaŭ la novajn vortojn, klarigojn pri la rilata gramatiko kaj solvi kelkajn interagajn ekzercojn. Al la lecionoj aldoniĝas ankoraŭ kelkaj resummaterialoj ekz. la korelativa tabelo, listo de propozicioj, afiksoj kaj kelkaj laŭtemaj vortlistoj. En la vortostoko de la materialo eblas serĉi laŭ la lingvoj. La programo estas libere uzbla kaj komputile kaj en modernaj aplikaĵoj, kiel saĝtelefonoj.


Vidu ĝin ĉe <http://learn.esperanto.com/>

Krome, esperantisto el Usono, Enrique Eleberg kreis jam antaŭ jaroj paĝaron en kiu troviĝas ĉiuj materialoj de la Zagreba Metodo por la lingvoj angla kaj hispana, <http://esperantofre.com/zagreb/zmkanto.htm> kaj ĉiuj aldonajoj (kantoj, La sentimulo, Esperanto ne estas nur lingvo, la bildstrio ktp. Tiuj du retejoj kompletigas sin reciproke kaj do enrete nun eblas lerni laŭ la ZM per ĉiuj de ni en Zagrebo kreitaj materialoj kun ekzercoj interaktive uzataj.

Spomenka Štimec

UNIVERSITATAJ SPORTAJ LUDOJ EN ZAGREBO KAJ RIJEKA (KROATIO)

En Zagrebo kaj Rijeka okazis junio 2-semajna sporta aranĝo: Eŭropaj sportaj ludoj de universitatanoj. Partoprenis pli ol 3000 junaj sportistoj – studentoj. Ĝi estis la dua tia aranĝo kiu okazas ĉiun duan jaron. Estas interese ke ĉi tie la sportistoj ne estas por akiri medalojn, sed ĉefe por amikumi, ĉar ili ja ne estas profesiaj sportistoj. Pro tio ili havas multan liberan tempon, ja la aranĝo daŭras du semajnojn. Kaj tio estas ideala eblo por prezenti E-on. Verŝajne multaj enamiĝis dum la aranĝo al iu alilanda junulo/junulino kaj ne povis komuniki – ĉar ja malgraŭ ĉio ne multaj regas la anglan. Tiuj pretus fari ĉion por laŭeble urĝe akiri ilon por komunikado. Des pli ke nuntempe oni povas por tio uzi retajn versiojn de la ekz. Zagreba Metodo, kaj sufiĉus informi ilin pri ekzisto de tiu ebleco.

COMMUNICATION PROBLEMS?**LANGUAGE BARRIERS?****LEARN ESPERANTO!**learn.esperanto.com

Bedaŭrinde zagrebaj esperantistoj komprenis tion nur kelkajn tagojn post la komenco de la ludoj kaj ne plu eblis aranĝi ke la organizantoj faru ampleksan informadon pri Esperanto. Tial Mihaela Cik, prezidantino de zagreba Studenta Esperanto-klubo, almenaŭ rapide kreis afiŝon, kiun ŝi dismetis en kelkaj lokoj kie la studentoj loĝis. Ni ne scias pri la rezultoj de tio, sed iu minimumo estis farita. Gravus atentigi esperantistojn en Coimbra, Portugalio, la urbo de triaj sportaj ludoj de eŭropaj gestudentoj okupiĝi serioze pri tio kelkajn monatojn antaŭ la aranĝo.

Zlatko Tišljár

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de aŭgusto 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Vitanyš Andriukaitis, Jozefo Reinbart, Maja Tišljár, Brian Moon, Halina Komar, Spomenka Ŝtimec, Esperanta Vikipedio

Kontakto: [ztisljar \(ĉe\) gmail.com](mailto:ztisljar@eunio.org)Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>